

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

Bonan Novaĵon !

Multajn jarojn post nia una peto, la urbestro de Hérouville-Saint-Clair finfine aprobis nian proponon !

La **20an de septembro 2014**, ni oficiale inaŭguros
"Skvaron de l'Esperanto" en la kvartalo "Grand Parc".

La saman tagon okazos la **Ĝenerala Asembleo de Esperanto-Normandie**.

Kompreneble ĉiuj partoprenontoj estos invitataj por la inaŭguro. Ankaŭ partoprenos tri **Rusoj** el nia ĝemela urbo Tiĥvin kaj **Koreanino** kiu haltos en nia urbo dum sia turneo en Francio. Espereble ni sukcesos venigi estrarajn membrojn de Esperanto-France kaj Sat-Amikaro.

Pli da informoj koncerne tiujn du okazaĵojn vi ricevos post la someraj ferioj sed bonvolu jam rezervi tiun daton.

Gérard SÉNÉCAL



189 personoj en kaj ekster la gubernio Fukui, kie estas **14 nukleaj reaktoroj**, metis peton pri malpermeso de refunkciigo de la nukleaj reaktoroj n-roj 3 kaj 4 de Ooi al la unuainstanca juĝejo Fukui, kaj la 21an de majo ili gajnis la proceson. Mi tradukos la verdikton koncize.

* La juĝejo uzis terminon "*jinkaku-ken* (*jinkaku*-rajto)". En vikipedio estas klarigo pri tiu vorto kaj tie mi trovis sinoniman, germanan vorton "*Persönlichkeitsrecht*", eble de kiu venis la japana traduko. Do la Esperanto-traduko estos "personeca rajto", kaj kies signifo estas "Rajto, kiu protektas personecan intereson". Unu el la fundamentaj homaj rajtoj baziĝanta sur rajto serĉi feliĉon garantiita en la artikolo 13 de Japana Konstitucio. .../... **Sekvo paĝo 2a**

La 21an de majo 2014 Juĝejo de Fukui malaprobis refunkciigon de la nukleaj reaktoroj n-roj 3 kaj 4 de Ooi Japanio

Cotisation

2014

Une croix rouge dans cette case indique que vous n'êtes pas à jour de votre cotisation **2014**. Merci d'envoyer votre règlement **8 Euros** à l'ordre d'« *Esperanto - Normandie* » à l'adresse indiquée ci-dessus. Merci pour votre soutien !

En tiu numero :

Fukuŝima katastrofo	2 + 6
E° Staĝo Hérouville	3 - 4
Akcepto de Ĉina paro	4
Eŭropa balotado 2014	5

Paĝo 2a

Juĝo de tiu ĉi juĝejo

1. Komence

Personeca rajto estas aprobita en nia Konstitucio (artikoloj 13 kaj 25), kaj en nia tuta leĝaro neniu alia leĝo superis tiun ĉi rajton. Kiam troviĝas ebla, konkreta atenco al la baza parto de personeca rajto kiel protekti vivon kaj teni vivadon, oni rajtas haltigi tiun atencon surbaze de personeca rajto. Personeca rajto devenas de persono, sed kiam formo de la atenco havas econ atenci personecan rajton de multaj homoj samtempe, peto pri haltigo de la atenco nature plifortiĝos.

2. Pri la nuklea akcidento en Fukuŝima

Pro la nuklea akcidento de la nuklea centralo n-ro 1 de 40 Fukuŝima pli ol 150 mil loĝantoj devas rifuĝi kaj dum la rifuĝado almenaŭ 60 homoj en hospitaloj mortis. Oni povas facile supozi, ke pli multaj homoj havis pli mallongan vivon, perdinte sian familian vivon kaj vivante malbonkondiĉe en rifuĝejo. Kiam okazis la akcidento, la prezidanto de « la Komitato de nuklea energio » diskutis pri rekomendo pri rifuĝigo de la loĝantoj en la radiuso de 250 kilometroj. Oni ne povas tuj opinii, ke tiu cifero 250 estas tro granda, ĉar ankaŭ en Ĉernobil loĝantoj en la radiuso de 250 kilometroj fuĝis.

3. Sekureco postulata al nukleaj centraloj

Sekureco kaj fidebleco postulataj al nukleaj centraloj devas esti tre altaj, kaj kiam okazos grava akcidento, oni devos preni ĉiajn rimedojn por protekti popolanojn kontraŭ nukleaĵoj. En tiu ĉi juĝado ni argumentis pri temo inter tiu fundamenta rajto kaj profito de refunkciigo de la nuklea centralo. Nukleaj centraloj havas gravan socian rolon produkti elektron, sed la funkciado de la nuklea centralo apartenas al ekonomia libereco kiel unu rimedo por produkti elektron, kaj laŭ la Konstitucio ĝi devas esti sub personeca rajto

Krom kataklismoj kaj militoj, nur akcidentoj en nukleaj centraloj havas eblecon atenci personecan rajton. Kiam oni vidas tian konkretan danĝeron eĉ malmulte, estas ...

nature, ke oni haltigu la refunkciigon. Danĝero de produkt-tekniko de elektro per nuklea energio kaj grandega damaĝo de nuklea akcidento estas jam klaraj dank' al la sperto en Fukuŝima. Se ni evitus juĝi pri tiu temo, tio signifus, ke ni forĵetas nian gravan taskon de la juĝejo.

4. Karaktero de nukleaj centraloj

Kiam oni produktas elektron en nuklea centralo, eligas kvantego da energio. Eĉ post haltigo de reaktoro, oni devas plu malvarmigi ĝin per akvo kaj elektro, kaj se perdiĝos elektro dum kelkaj horoj dume, tio kaŭzos akcidenton, kaj se okazos akcidento, ĝi pli kaj pli grandiĝos. Tio estas esenca danĝero, kiun enhavas nuklea produktado de elektro.

5. Tenado de malvarmiga funkcio

Kiam okazos granda tertremo, oni devos haltigi reaktorojn, malvarmigi ilin per akvo kaj fermi nukleaĵojn. Nur per tiuj tri rimedoj oni povas teni reaktorojn sekuraj, sed troviĝas en la nukleaj reaktoroj n-roj 3 kaj 4 gravaj mankoj pri la funkcioj de malvarmigado kaj fermado. Kiam okazos tertremo pli forta ol 1260 galojn, malvarmiga sistemo rompiĝos kaj tio kaŭzos fandiĝon de nukleaĵoj, poste povos okazi eksplodo, kaj sekve la loĝantoj devos rifuĝi longan tempon. Mekanismo kaj analizo pri tertremoj devas baziĝi sur hipotezo kaj konjekto dependantaj de malmultaj donitaĵoj. Do oni ne povas fari sciencan hipotezon, ke tertremo pli forta ol 1260 galoj neniam okazos al la nuklea centralo Ooi. En Japanio jam okazis tertremo kun forteco de 4022 galoj en la gubernioj Iŭate kaj Mijagi. La japana insularo situas ĉe la limoj de Pacifika, Oĥotska, Eŭrazia kaj Filipinaj platoj, kaj 10% de la tertremoj okazintaj en la mondo okazis en nia insularo. Nenie troviĝas lokoj, kie ne okazos tertremoj. Japanio estas tertrema lando. En tiu ĉi insulo supozi, ke ne okazos tertremoj pli fortaj ol la supozataj skuoj, estas tro optimisme. Oni povas taksii la danĝeron en la nuklea centralo Ooi kiel realan, urĝan danĝeron.

6. Pri fermado de nukleaĵoj (danĝero de uzitaj brulaĵoj) : En nukleaj centraloj iliaj konstruaĵoj devas esti fortikegaj por ke radioaktivaĵoj ne eliru eksteren, kiam okazos akcidento. En la nuklea centralo Ooi nukleaj brulaĵoj estas en la fortikaj reaktorsekurujoj. Tamen pli ol mil uzitaj brulaĵoj estas metitaj en la akvujoj, sed ne troviĝas ...

Sekvo : paĝo 6a

STAGE ESPÉRANTO (Initiation et perfectionnement)

Samedi 18 et dimanche 19 octobre 2014

à Hérouville-Saint-Clair (14, Calvados)

Maison des Associations 10 - 18 Grand Parc

Ce stage sera dirigé par le Slovaque Stano MARČEK et le Français Michel DECHY, deux animateurs expérimentés et reconnus au niveau international.

Infos pratiques:**- Hébergement :**

Pour les personnes qui viendront de loin et qui en feront la demande sur la fiche d'inscription, il sera possible d'être accueilli par les espérantistes locaux.

- Repas :

Afin de ne pas perdre un temps précieux en nous déplaçant vers un lieu extérieur pour manger, nous proposerons une formule de restauration rapide sur place les samedi midi, samedi soir et dimanche midi (voir fiche d'inscription)

- Contacts :

Gérard SÉNÉCAL 06 89 74 26 65 gigesenecal@gmail.com

Yves NICOLAS 06 44 87 22 48 ivnicolas@sfr.fr

PROGRAMME DU WEEK-END : (voir le document au verso)**STAGE ESPÉRANTO*****Initiation et perfectionnement*****Samedi 18 et dimanche 19 octobre 2014, à Hérouville - Saint - Clair****Fiche d'inscription (1 par personne)** Faire des photocopies, si besoin.

Nom : Prénom :

Adresse:

Tel. : Courriel :

Niveau souhaité : INITIATION : oui non PERFECTIONNEMENT : oui non

Je souhaite être hébergé samedi soir : oui non Personne seule : oui non

Couple : oui non

Frais d'inscription : 25 euros :

Repas : 8 euros : samedi midi : oui non

samedi soir : oui non

dimanche midi : oui non

TotalFiche d'inscription à renvoyer avant le 20 septembre 2014 avec le règlement(Chèque à l'ordre de Hérouville Esperanto) à : Véronique CHARLES, 65 rue d'Authie 14 000 CAEN**N.B.** Le nombre total de participants sera limité à 45 Les inscriptions seront donc enregistrées dans l'ordre d'arrivée.

Programme du week-end

SAMEDI 18 OCTOBRE

- 8.30 - 9.30 Accueil
9.30 - 11.00 Cours d'initiation par la méthode directe (Stano Marček)
 Cours pour le groupe de perfectionnement (Michel Dechy)
11.00 - 11.30 Pause
11.30 - 13.00 Suite des cours et apprentissage de chants
13.00 - 14.00 Restauration rapide sur place
14.00 - 16.00 Cours d'initiation et de perfectionnement
16.00 - 16.30 Pause
16.30 - 17.30 Suite des cours
17.30 - 18.00 Chant (chaque groupe avec son animateur ou ensemble?)
19.00 - 20.30 Restauration sur place
20.30 - 21.30 Présentation de l'œuvre de Hergé (Michel Dechy)

DIMANCHE 19 OCTOBRE

- 9.00 - 11.00 Cours d'initiation et de perfectionnement
11.00 - 11.30 Pause
11.30 - 13.00 Suite des cours et chant
13.00 - 14.00 Restauration rapide sur place
14.00 - 17.00 Cours d'initiation et de perfectionnement
17.00 - 17.15 Pause
17.15 - 17.45 Les deux groupes chantent ensemble
18.00 Fin du stage. Premier bilan



En Hérouville Saint
Clair - CAEN, la grupo
akceptos la 22an - 24an
de junio, Ĉinan paron :
PENG Zhangming
kaj **ZHANG Li**.

REZULTOJ DE ESPERANTO EN FRANCO,
EN LA EŬROPA BALOTADO DE MAJO 2014

Paĝo 5a

La partio **Europe-Démocratie-Esperanto** (EDE) prezentis kandidatojn en la ok balotaj regionoj laŭ kiuj estas dividita la franca teritorio por la elekto de la francaj deputitoj de la Eŭropa Parlamento. Tiu, partio, sume ricevis 33 096 voĉdonojn el 18 840 609 esprimataj voĉoj, tio estas 0,17 %. Tiu procento estas ekzakte la sama kiel tiu de la samcela balotado de la 07-a de junio 2009, kiun oni povas retrovi en la numero 238a de nia Normanda Esperanto Bulteno. Jen la rezultoj 2014 laŭ la regionoj, eliritaj el ĵurnalo "Le Monde".

<u>Regionoj</u>	<u>Nombro da esprimataj voĉoj</u>	<u>Nombro da voĉoj por EDE</u>	<u>Procento</u>	<u>Rimarkindaj apartaj kazoj</u>
<u>Nord-uesto</u>	2 719 153	5 023	0,18 %	Saint-Brieux 0,25 %
<u>Uesto</u>	2 725 079	4 308	0,16 %	
<u>Eosto</u>	2 428 600	4 712	0,19 %	Colmar 0,30 % Troyes 0,30 % Vesoul 0,34 % Lons le S. 0,30 %
<u>Centro</u>	1 472 743	3 404	0,23 %	Montluçon 0,31 % Blois 0,32 % Joué les T. 0,32 % Dreux 0,33 % Moulins 0,38 %
<u>Sud-Uesto</u>	2 941 083	4 714	0,16 %	Tarbes 0,30 %
<u>Sud-Eosto</u>	3 318 163	5 898	0,18 %	Romans 0,31 % St Chamond 0,46 %
<u>Francilio</u>	2 950 567	4 018	0,14 %	St Ouen 0,31 % Meulun 0,34 % Corbeil 0,56 % La Courneuve 0,35 % Epinay s S. 0,39 % Cergy 1,09 % Chatou 1,28 %
<u>Transmaro</u>	285 221	939	0,33 %	Fort de Fr. 0,41 % St Leu (Reu) 0,38 St André 0,47 % Tampon (Reu) 0,53 % Le Port 1,07 % Nouméa 0,36 %
<u>Sume</u>	18 840 609	33 096	0,17 %	

Ni estus povintaj atingi pli bonajn rezultojn, ne ni mem voĉdonante por EDE, kion ni plej-ofte ne faris ĉar malgraŭ nia amo al la internacia lingvo ni havas aliajn sociajn prioritatojn, sed almenaŭ uzante la afiŝtabulojn kiuj estis je nia dispono por afiŝado de propagandiloj. Bedaŭrinde, tiuj al ni rezervitaj tabuloj restis plejofte silente oferitaj, nekovritaj, nudaj kaj virgaj ...

Farante balotan kampanjon por EDE, ja sciante ke ni mem ne voĉdonos por tiu partio, ne estas malhonesta kontraŭdiro : tiel agante, ni proponas al la 60 % da sindetenantoj, okazon voĉdoni por defendinda ideo, sen ke ili tiel eniru en la ĝeneralan politikon kiun ŝajne, ili ne ŝatas.

Henri ROUSSEAU

Kotizo por 2014

Faru vian ĉekon profite de:

ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN

Abon-kotizo por 2014 : 8 Eŭroj,

kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand,

2 Résidence Les Terres Quemines

76113 Hautot-sur-Seine.

Sekvo de la paĝo 2a :

... fortikaj instalaĵoj, kiuj malhelpos nukleaĵojn flugi eksteren. Uzitaj brulaĵoj eligadas disradiantan varmon kaj estas tre danĝeraj. En la nuklea centralo Ooi, se mankos elektro, post tri horoj oni ne povos trempadi uzitajn brulaĵojn en akvo, kaj tio kaŭzos krizan situacion. Ili ne estas fermitaj en fortikaj instalaĵoj, sed kuŝas preskaŭ nudaj.

7. Pri la sekureco de la nuklea centralo Ooi kaj neceso haltigi la refunkciadon.


Laŭ la starpunkto, ke personeca rajto surbaze de vivo de la popoloj devas esti protektata kontraŭ danĝereco de nukleaĵoj, la teknikaĵoj kaj instalaĵoj pri sekureco de tiu ĉi centralo estas ne perfektaj, aŭ tro malfortaj surbaze de optimisma antaŭsupozo. Pro tio haltigo de refunkciado de la nukleaj reaktoroj estas tre taŭga kaj utila rimedo por malgrandigi konkretajn danĝerojn.

8. Aliaj pledoj de la akuzintoj (ellaso)

9. Aliaj pledoj de la akuzitoj

La akuzitoj pledas, ke refunkciado de la reaktoroj kontribuos al stabila liverado kaj malmultekostigo de elektro, sed tiu ĉi juĝejo opinias, ke diskuti pri homaj rajtoj de multaj homoj, komparante kun kosto de elektro, ne estas leĝe permeseble. Temante pri tiu kosto, troviĝas argumentoj, sed eĉ se ek-estos granda deficiito en la japana internacia komerco, tio ne estas perdo de nacia riĉo. Ke la popoloj vivas trankvile en la riĉa lando, tio estas nacia riĉo. Kiam ili perdos tiun vivon, tio estas perdo de naciariĉo. La akuzitoj ankaŭ pledas, ke la refunkciado de la nukleaj reaktoroj helpas malmultigi karbonan dioksidon (CO₂), sed kiam okazos grava akcidento, ĝi multege poluos la medion.

Zono en la radiuso de 250 kilometroj de la nuklea centralo Ooi



Estas tute kontraŭlogike, ke ili pravigas la refunkciigon, pretekstante mediprotektadon.

10. Konkludo

Tiuj akuzintoj, kiuj loĝas en la radiuso de 250 kilometroj de la nuklea centralo Ooi, povos esti en konkreta danĝero, ke ilia personeca rajto estos rekte atencita de la refunkciigo de la reaktoroj, do ilia peto estu aprobita.

La dua civila fako de la Unuinstanca Juĝejo Fukui
ĉefa juĝisto Higuĉi Hidejuki
juĝisto Išida Akihiko
juĝistino Mijake Joŝiko

Reagoj

Tiun verdikton multaj homoj bonvenigis :
"Estas bonege, ke la juĝejo pli alte taksas la vivon ol ĝi taksis la ekonomion".
"Lastatempe mi evitis legi ĵurnalojn, ĉar aperadas senesperigaj novaĵoj, sed hodiaŭ mi renkontis bonegan novaĵon!"
"La plej valora estas homa vivo. Mi esperas, ke tiu bona ideo disvastiĝos".
"Tiu verdikto rezultis el diligentaj agadoj de la akuzintoj, adovatoj kaj multaj subtenaj homoj. Ni ĉiuj devas agadi plu. Mi dankas al la juĝistaro pro tio, ke ĝi verdiktis, ke la homa vivo estas la plej valora."

Tamen la registaro tre malvarme reagis al la verdikto :

« La registaro neniam ŝanĝos la politikon pri atom-energio. Ni refunkciigos reaktorojn, kiujn la Nuklea Reguligada Aŭtoritato taksas sekuraj. Tio estas ĝusta sinteno".

**Teksto tradukita el la japana,
fare de HORI Jasuo (Japanio)**